# *Debato pri artefarita intelekto en la Kuba Cifereca Projekto*




**Cubaliteraria**

Havano, feb 17 (RHK) Artefarita intelekto: etiko, riskoj kaj ?ancoj. Vizioj el Unesko estas la titolo de la konferenco, kiun faros ?i-sabate D-ino Claudia Felipe, kunordiganto de la Programo pri Sociaj kaj Homaj Sciencoj de la Regiona Oficejo de tiu organizo.

En lastatempaj internaciaj libroaran?oj oni ripetis la gravecon de ?i tiu temo, altirante la atenton de redaktoroj, verkistoj kaj literatur-amantoj, reliefigas la retejo Cubaliteraria.

En ?iam pli ciferecigita mondo, la intersekci?o inter homa kreivo kaj avangarda teknologio levis fundamentajn demandojn pri la etiko, riskoj kaj ?ancoj kiujn artefarita intelekto (AI) prezentas en la

produktado kaj distribuado de literaturaj verkoj.

Tiu ?i programo okazas kadre de la 32-a internacia librofoiro de Havano sesianta en la fortreso San Karlo de la Kabano kaj en aliaj 16 kromaj sidejoj en la kuba ?efurbo ?is la 25-a de februaro.

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/347479-debato-pri-artefarita-intelekto-en-la-kuba-cifereca-projekto

**Radio Habana Cuba**